

FENIKSO



INFORMILO POR
AMIKA
RONDO DE
ESPERANTAĴ-
KOLEKTANTOJ



Redaktas: R. Jensen, Sdr. Ringg. 77, DK-8000. Århus C

Nr. 12. 1. 11. 1970

Dua jaro nr. 7

ESPERANTO-"HIPI"-MARKOJ

La Internacia Esperanto-muzeo, Wien, skribis en sia "Informilo", februar 1970. (pĝ 6):

"Jonathan Pool, Chicago, USA, sendis donace efikan kaj modernan varbmaterialon: Butono "Venu la verda venk'!" Glumarkfolio kun 30 div. tekstoj kun desegnaĵoj, ekz: "Savu malsamideojn!", "Esperantistoj ne mortas!" "Krokodiloj go home!" k.t.p. (Prezo ne indikita)."

Post tio mi skribis al la adreso la 2an de marto kaj petis pri alsendo de 30 glumarkoj; kaj la 24an de aprilo mi ricevis la de mi deziratan folion kun 30 div. dentitaj glumarkoj kun la mirigaj tekstoj kaj "sloganoj". 2 el ili rilatas al "Volapük" kaj unu al la latina lingvo. Kelkaj el la tekstoj ne estas senpere kompreneblaj kaj ŝajne ne estas bonaj varbiloj por Esperanto. Ekz. 1) Varbu papagojn! 2) Varbu frenezulojn! 3) Varbu frenezajn papagojn! - Aliaj estas tre bonaj. Oni povas diri, ke ili estas

originalaj kaj fantaziaj. La folio havas la jenan grandecon: h. 215 mm, v. 280 mm inclusive la malsupraj randmarkoj sur kiuj staras, ke la folio estas: "Made en Esperantujo" 1969 - kaj eldonita de "Internacia Krim-Sindikato".
 Ĝi do estas miksaĵo de seriozo kaj ŝerco.

Franz Mayer

UNO ESTAS !
 PAPERTIGRO !

✂

IOE ESTAS PAPERKANONO!

Rimarko de la red.:

Ĉar mi somere devis prokrasti la supran noticon al venonta numero de "Fenikso", mi intertempe skribis al USA demandante pri eventualaj klarigoj. S-ro Jonathan Pool rapide respondis.

Mi ne detale povas respondi al via demando pri la celo de la "Hipi-markoj", ĉar tio estas grandparte kaŝita. Kiel vi povas vidi, la markojn produktis organizaĵo nomita "Internacia Krim-Sindikato", kies adreso kaj membraro estas nekonataj. Antaŭ kelkaj monatoj ni simple trovis pakajon en nia universitata poŝtkesto, kaj ĝi enhavis stokon de tiuj "Hipi-markoj".

La sola devenindiko sur la pakajo estis presita afrankstampo en unu angulo, kiu tekstis "T.P.Zamenhof, Esperantujo". Do ŝajnas ke temas pri unu el tiuj Kanguro-similaj ŝercularoj.

Ni decidis ke la markoj fakte estas iom humuraj, kaj ke eble ni povos replenigi nian bankrotan klubkason vendante ilin.

La prezo de folio estas po 0,25 usonaj dolaroj (2 rkp), aŭ nur 0,15 dolaroj, se vi samtempe vendas 10 foliojn aŭ pli. Ni vendas ankoraŭ "Hippi-pinglojn", t.e. metalaj butonoj kun pingloj por survesta portado. Po 0,25 dolaroj. Ĉiuj prezoj inkluzivas mar-afrankon. Se aerpŝta livero estas dezirata aldonu 1 rkp. La adreso estas: International Language Society. University of Chicago. 1212 East 59th Street. Chicago, Illinois 60637. U.S.A. □

GLUMARKOJ

GLUMARKOJ 1970. (Daŭrigo)

- 12) 8-a somera Esperanto universitato, Gyula, Hungario. 5 - 11. julio 1970. (H)(55x47) nedent. fol. 2x2=4. Teksto aranĝita kiel kadro ĉirkaŭ bildo de la fama fortikaĵo. Verda. Sur maldekstra flanko de la folio estas presita duoble 3 eĝa Esperanto-flageto, kiun oni povas eltondi kaj faldi ĉirkaŭ stangeto, ekz. 10 cm longa kaj 2-3 mm dika. Tiam oni havas uzeblan Esp.-flaĝeton Troviĝas provpresoj, nigraj sur blanka aŭ verda, paperoj. Unu marko sur papero tiel granda kiel tutfolio. Akirebla ĉe: D-ro Bálint Szemenyei, Huba - u 38. Orosháza. Hungario.
- 13) DDR - Esperantotreffen. Karl-Marx Stadt. 1970. (papero proks. (K)(60x60) fol. 2x1=2. trĉ. laŭ la ekstera rando, dentita inter la 2 markoj. Stilizita globo kun E.stelo. Plia teksto: Esperanto lingvo internacia. Ruĝa kaj verda. Proponita de Burmeister. La stoko jam estas elĉerpita.
- 14) En Izraelo aperis nedatitan glumarkon. (H)(45x19) horizontale dentita. Nigra tek-

sto sur verda papero. Nur la vorto Esperanto estas presita per latinaj literoj, la resto estas hebrea.

Sed laŭ traduko de s-ro A. Lokemond ĝi diras: Esperanto la dua lingvo de ĉiu homokomuna lingvo por la tuta mondo.

Akirebla ĉe: S-ro J. Giledi, Ĉernikovsi 2, Kfar Saba. Izraelio. Prezo ne indikita.

STAMPOJ

Pri katalogado

Responde al mia demando pri la strangaj vortoj (titolvortoj) sur pĝ. 54 punktoj 2 kaj 3, s-ro Amouroux amike skribis i. a.:

MARKOFILIO. Vi tute pravas, kaj mi petas vian senkulpigon. Mi esperantigis anglan vorton, kiu estas tre uzata ankaŭ inter francoj.

La signifo estas ja: Kolekto de poŝtstampoj. En mia letero mi intencis ja diferenci la memorigajn poŝtstampojn - ĉu nuligaj, ĉu ornamaj kaj la kontorajn, kiuj estas sen nuliga aŭ ornama povo.

APARTAĴOJ DE LA POŬTO. Vi ankoraŭ pravas. Mi devus diri "apartaj aĵoj". Jes, estas nenio aparta ĉe etikedo, sed katalogo, kiu listigas nur stampojn, ankaŭ devus noti - en aparta kategorio - la "aĵojn", kiuj ne estas stampoj, sed kiuj anstataŭigas stampojn necesajn ekzemple je regula ekspedo de registritaj poŝtaĵoj, memkompreneble se ili havas rilaton kun Esperanto.

□□□□

POŬTAJ STAMPOJ - AU NE ?

Dum trastudo de brazilaj stampoj ekestis fortaj

duboj pri poŝta aŭtentikeco ĉe kelkaj stampoj. Tio koncernas la stampojn n-roj 5, 6, 8, 10, 12, 24. En ĉiuj tiuj stampoj mankas la enskriboj "Correios", kiun posedas ĉiuj aliaj poŝtaj kaj ornamaj stampoj de Brazilo. Ĉu denove envicigi tiujn dubindajn stampojn en novan katalogon? Certe pli bone estas antaŭa esploro pri la aŭtentikeco.

□□□□

B

POŝTA STAMPO DE ABALIGET 1968

Tiu stampo ne ekzistas... Informo pri tiu stampo montriĝis esti ne ĝusta. La informinto mem ĝustigis la aferon.

□□□□

B

VARIAĴOJ PRI "PARIS INVITAS VIN 1937"

Antaŭ mi kuŝas 2 fotokopioj pri tiuj variaĵoj, pri kiuj informis nin nia amiko Amouroux. Vidu: Fenikso nr.6 pĝ 6.

Mi komparis tiujn kopiojn kun mia propra ekzemplero, kaj montriĝis ke ekzistas 3-a variaĵo. Mia ekzemplero montras mankon de angulo de kadro nur en maldekstre supra angulo. Maldekstra malsupra (angulo) kaj teksto estas sendifekta.

Mi nun demandas niajn AREK-anojn ĉu indas katalogi ĉiujn tri variaĵojn? Mia opinio estas ke fakte temas pri tri variaĵoj de tiu stampo. Kaj specialkatalogoj de poŝtmarkoj ankaŭ mencias ĉiujn konatajn variaĵojn.

Mi alvokas ĉiujn AREK-anojn je kunlaboro.

□□□□

B

VARIAĴOJ PRI AUGSBURG 1970 kaj München 1948

En Augsburg estis uzataj du stampiloj. La unua stampilo montras daton sen horo, dua stampilo

daton kun horo. (horo post la jarcifero)

Multaj el ni cerbumis niajn kapojn pri la in-
formo (ĉe Germanujo nr. 6) "kun 4 fakoj" kaj
"kun 3 fakoj". Kie troviĝas tiuj fakoj?
Nia amiko Frank Tichý sukcesis trovi la dife-
rencon:

1) Okulfrapa estas la diversa grandeco de la
+-signoj apud la vorto (13b) München 2.

2) En la montrita katedralo troviĝas la ger-
manlingva vorto Pfingsten. En la stampaĵo kun
la granda +signo litero g troviĝas en tria fa-
ko de meza parto, kaj en la maldekstra flanko
de la katedralo ni nombras 4 fakojn.

En la stampaĵo kun la malgrandaj +signoj litero
g el vorto Pfingsten troviĝas en la kvara fako
de meza parto, kaj en la maldekstra flanko de
la katedralo ni nombras 5 fakojn.

3) Ekzistas pluaj signoj, per kiuj oni po-
vas diferencigi ambaŭ stampaĵojn:

Tiu kun 4 fakoj:

litero E en Pfingsten estas longa 1 mm.

litero N en München estas difektita.

cifero 4 en dato 16.5.48 estas nedifektita.

Tiu kun 3 fakoj:

litero E en Pfingsten estas longa 2 mm.

litero N en München estas nedifektita.

cifero 4 en dato 16.5.48 estas difektita.

B

[REDACTED]

KIAM NOVA KATALOGO ESTAS FRETA ?

Senpacience niaj AREK-anoj atendas eldonon
de nova katalogo pri stampoj.

Ĝi enhavos fotokopiojn de ĉiuj ĝis nun kona-
taj stampoj. Kaj fakte mi jam posedas ĉiujn la
fotokopiojn. Prilaboro de tiuj fotokopioj est-
is grandega laboro, ĉar multaj apenaŭ estis
legeblaj. Tial mi devis restaŭracii ĉiujn fo-
tokopiojn, tiel ke la stampoj estu de origina-
la aspekto. Tial povas okazi, ke la montrotaj

bildoj ofte estas de pli bona aspekto ol la originaloj. Mi esperas, ke post presado de la katalogo tiuj estos videblaj en sama kvalito.

Sed NE eblas jam nun presigi ĝin! Kial? Unue mi deziras havi ĉiujn ankoraŭ aperontajn stampojn de la jaro 1970. Kaj fakte ankoraŭ daŭre aperos stampoj. Eĉ mankas bona kopiode Takatsuki 1970. Originalon mi ne jam havas.

Due okazas ankoraŭ diskutoj pri poŝta aŭtentikeco de kelkaj stampoj. (brazilaj).

Tiuj duboj ni komune devus klarigi kaj forigi. Se nova katalogo aperu, tiam ĝi estu bona labormaterialo. Neniel mi per tio volas malaltigi valoron de la ĝisnunaj katalogoj. Ili estis bonega fundamento por tiu nova katalogo.

Cetere mi ricevis la ideon krei novan katalogon, kiam en tutŝtata poŝtmark-ekspozicio en Karl Marx Stadt 1967 renkontiĝis 6 filatelaj objektoj pri Esperanto el 4 landoj. Multaj de niaj AREK-anoj siatempe persone renkontiĝis kaj konantiĝis dum tiuj tagoj.

Estu do paciencaj!

Burmeister

ANONCO.

Mi havas duoblajn stampojn de Finnlando 1, Hungarujo 1, Japanujo 1, Ĉeĥoslovakujo 16, Nederlando 1, Jugoslavio 1, Pollando 2, Aŭstrio 3, 8, Bulgario 3, kaj Germanujo 8.

Kaj mi bezonas: Jugoslavio 2c, Belgujo 1, Britujo 1, 2, 3, 7, Ĉeĥoslovakujo 1a, 8, Danujo 1, Francujo 1, 2, Germanujo 1b, 3, 13, Italujo 1, Norvegujo 2, Nederlando 7ni, Sovetunio 1, Svedujo 1, 2, kaj Svisujo 1, 3.

Donu al mi ofertan!

Stanislav Biesiada,
Czestochowa 1. F.O. Box 44.
Pollando.

STAMPOJ 1970. (daŭrigo)

- 16) GYULA Hungario. 5/7 - 11/7. Ŝildforma nigra stampo (32x40). Skizo de fama fortikaĵo kaj 2-lingva, kadra teksto pri la 8-a Somera Esperanto Universitato.
- 17) ABALIGET, Hungario.
3-a renkontiĝo de naturamikoj.
- 18) Rilate la stampo de DDR menciita sur pĝ 55 en Fenikso alvenis pliajn detalojn. Ĝi montras stilizitan globon kun E.stelo. Teksto ESPERANTO TREFFEN DDR 1970.
25. bis 27.9.1970. KARL MARX STADT.
La stampo estis uzita en 3 lokoj dum monato septembro. Nome en:
- a) GLAUCHAU, 3. - 10/9
 - b) OSCHATZ, 11. - 20/9
 - c) Wismar, 21. - 30/9.
- Laŭ tiu sciigo la stampo tute ne estis uzita en la urbo Karl Marx Stadt, kie la Esperanto-treffen okazis.
- 19) Międzygórze, Pollando. 18/9 - 1/10.
6-a Internacia Esperantista Ferio.
- 20) BYSTRZYCA KŁODZKA, Pollando
26/9 Esperantista renkontiĝo.
- 21) GDANSK, Pollando. 3/10.
25 jaroj de Esperantista movado en renaskiĝinta Pollando
- 22) BIALYSTOK, Pollando. 5 - 11/10
Internacia semajno de korespondado
- 23) OLSZTYN 1. Pollando. 5 - 11/10
Internacia semajno de korespondado
- 24) DARMSTADT. Germanujo.
9 - 11/10.
14-a jarkunveno de G.E.F.A.
Bildo de flugilrado kaj vapor-lokomotivo.

TUTAĴOJ

S-ro Werner Simon skribis la 21/10 i.a.:

Kara amiko!

Mi ĵus ricevis Fenikson nr. 11 kaj trovis ĝin interesa kiel kutime.

Mi bone konas la historion de la svisaj tutaĵoj kaj mem posedas kelkajn aliajn, nome:

NEUCHATEL - Chateau

MURREN - Bahn mit "Jungfrau",

APPENZELL i Rh. - Alpenmassiv

krom la jam menciitaj Bürgenstock kaj Graubünden.

Tiuj ĉi poŝtkartoj ne estas oficialaj aŭ poŝte eldonitaj. Svisa Idisto, kiu malgraŭ sia idista prefero subtenis ĉiujn mondlingvajn klopodojn, preparis la esperantlingvan tekston kiel surpreron sur ordinaraĵ svisaj poŝtkartoj.

Li ankaŭ eldonis sam-maniere poŝtkartojn kun Ido-tekstoj, kiuj mencias Ido-n kiel Esperanto reformita. Tuta serio ekzistas.

Ili sendube estas interesaj, sed tute privataj. Ĉiuajn persono povas aranĝi samajn kartojn, se li aĉetas ilin ĉe la poŝtofacejo kaj poste surpras ilin kun ia teksto

oOoO

S-ro Amoureux skribis 5/10 pri la hungara tutaĵo:

Mi deziras danki D-ron Toth por la klarigoj koncerne la surprisita tutaĵo. Tamen mi ne konsentas, kiam li diras, ke ne estas necesa ĝin listigi. Jes la karto jam ekzistis kaj estis katalogita, - sed la surpriso absolute ŝanĝas la celon de la karto.

Ĉu surprisitaj poŝtmarkoj ne havas propran numeron?

Redakcia rimarko: Laŭ fotokopio, kiun s-ro Amou
roux kunsendis, oni povas konstati, ke temas
pri nr. 3 en la katalogo de Saget. Tiu karto
havas la poŝt-numeron D-16 kaj montras: Lago
Balaton, Velŝipoj apud Tihany. La afranka va-
loro estas 10 filler + 2 filler favore al la
turismo de la Balaton-lago.

Sur la priparolita karto tiuj valoroj estas
kovritaj per brikformaj surpresoĵoj aŭ stampoj,
kaj la vortoj: Postaszoigálati ügu estas pre-
sitaj en la sudokcidenta angulo de la karto en
la rubriko "Feladó" (Sendinto).

Do, la origina poŝtkarto estas per tiu surpr-
eso transformita al simpla formularo (sen afran-
ka valoro) uzebla en la poŝta servo.

Alivorte: Ĝi ne plu estas "tutaĵo" kaj tial ne
estas katalogenda en "tutaĵ-katalogo".

Sed estas ja privata afero, ĉu oni kiel espe-
rantisto volonte konservas ekzempleron de tia
"antaŭa-tutaĵo" pro la esperantlingva teksto
sur ĝi. Sed ĝi estas poŝta-formularo - ne
katalogenda. □

o00o

Demando pri Tutaĵ-katalogo

Inter niaj asociaj taskoj estas ja ankaŭ eldo-
nigo de katalogoj pri Esperantaĵoj, sed pro nia
malfacila ekonomia stato tiu tasko ĉiam estas
forŝovita.

Tamen nia membro, Vladimir Vaňa, havas preta
projekton por tia katalogo.

Nun estas la demando, ĉu tia katalogo estas
sufiĉe dezirata de niaj membroj. Ĉu ni povos
vendi tiel multe da ekzempleroj, ke la kostoj
almenaŭ parte estos regajntaj.

La manuskripto ampleksas 22 paĝojn formato A 4

(sen bildoj). S-ro Váňa ne povas mem duplikigi ĝin, kaj li demandis, ĉu eble "Fenikso" povus fari tiun laboron. Al tio mi respondis Jes! Se nur sufiĉaj antaŭmendoj envenos. Mi supozas ke la vendprezo, inkl. sendkosto, estos maksimume 10 int. rkp.

Se vi havas intereson por la projekto bonvolu skribi al s-ro Váňa kiom da ekzempleroj vi povos aĉeti (por vi mem aŭ por viaj kolegoj).

Por ke ni eldonu la katalogon proksimume 20 antaŭmendoj estas necesaj.

-o00o-

Kiu povos informi pri japana aerogramo?

S-ro Amouroux ricevis rekte de Takatsuki, (Osaka) aerogramon stampita per la porokaza stampilo uzita dum la 57-a japana E-kongreso kaj la ordinara urba dat-stampo de Takatsuki.

Tiu aerogramo estas interesa en pluraj rilatoj, kaj ĝi okazigis multan spekulacion ĉe la ricevinto, ĉar estas malfacila destini, ĉu temas pri "poŝta" eldono aŭ pri privata eldono.

Se ĝi estas poŝta, ĝi ja estas inda por katalogado, - sed kontraŭ poŝta deveno parolas tio, ke ĝi ne havas surprisitan poŝtmarkon (do ne estas "tutaĵo"), ĝi estas afrankita kun ordinara poŝtmarko. La koloro de la papero estas blueta. La kutima teksto kaj klarigo por la uzo de la aerogramo estas presita ne nur en japana kaj angla lingvoj - sed ankaŭ en Esperanto. Tiu lasta estas ŝajne alpresita poste en verda koloro. Plie estas en sudokcidenta angulo verde presita granda Esperantostelo kaj la vorto ESPERANTO. Tio ankaŭ estas indiko por privata eldono, ĉar ŝtata poŝto almenaŭ ne volus presi tiun "privatan reklamon". Sur la adresflanko troviĝas ankaŭ verde stampita la insignon por la 57-a JEK, en kio la urb-nomo estas literumita: Takatuki.

Ŝajne temas pri aerogramo, kiu estas aĉetita de Esperanto-organizaĵo, kiu poste lasis alpresigi tute la esperantan tekston, kaj vendis la stokon por uzo en la esperantista korespondado.

La demando estas unuavice, ĉu la origina aerogramo estis eldonita de la poŝto - aŭ ne.

Tuj post la ricevo s-ro Amoureux demandis la sendinton en Japan pri eventuala klarigo, sed ĝis nun ne venis respondo.

Tial li demandas ĉi tie: Ĉu iu AREK-ano povas klarigi la aferon sciigante ĉu la aerogramo estas vere poŝta aŭ nur privata?

Almenaŭ - kaj en ambaŭ okazoj - oni povas diri, ke tiu aerogramo estas interesa "Esperantaĵo" kolektinda. - pri oficiala poŝta eldono oni devas dubi. □

-oo00oo-

La redaktoro ankoraŭ ne scias, ĉu aperos pli da numeroj de Fenikso en ĉi tiu kalendara jaro. Se "ne" nova numero aperos almenaŭ tuj post novjaro 1971.

Estas tial necesa jam nun - komence de novembro - deziri por niaj legantoj ĉion bonan por la kristnaska festo kaj la jarŝanĝo:

"GOJIGAN KRISTNASKFESTON"

Reinhold Jensen

—0000—